

La etapoj de la svisa federalismo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 507, 1981.08.20 & 22

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Svislando estas federigo de 26 ŝtatoj aŭ kantoj. Kio estas okulfrapa en tiu politika divido, tio estas la manko de ekvilibro. Grandaj ŝtatoj kunvivadas kun etaj ŝtatoj. La limoj desegnas komplikajn konturojn. Tiu divido korespondas al historia evoluo, kiu originas en la profundo de mezepoko.

A.- La kanto la plej loĝata estas Zürich. Laŭ la loĝantoj Zürich estas 80-foje pli potenca ol la kanto Appenzell Interna Rhodo. Laŭ la areo la kanto Graubünden estas 30-foje pli vasta ol la kanto Zug.

Cl.- Komparante la kantonajn limojn kun la limoj de la lingvoj kaj religioj, oni konstatas, ke ili ne koincidas. Se ekzistas unulingvaj kantoj, kiel nia kanto Neuchatel, kiu estas franclingva, ankaŭ ekzistas kantoj dulingvaj, kiel Valezo, kiu estas german- kaj franclingva kaj eĉ unu tri-lingva kanto, kiel Graubünden. Ekzistas kantoj, kie la katolikismo aŭ protestantismo estas la ŝtata religio: Valezo estas katolika, Glarus estas protestanta. Sed en multaj kantoj kunvivadas ambaŭ religioj, kiel en Ĝenevo.

A.- En la lingva kunvivado sole la germanan parolas pli ol duono de la svisa loĝantaro. La latinidaj franca, itala kaj romanĉa lingvoj estas la propreco de minoritatoj.

Cl.- Religie ni observas certan ekvilibron inter la protestantoj kaj la katolikoj.

A.- Resume, Svislando estas kompleksa kuniĝo de elementoj, kiuj kutime dividas pli ol ili unuigas.

C1.- Svislando nek rezultas de geografia unueco, nek de la radiado de centrigo urbo, nek de la volo de familia dinastio, nek de lingva sameco, nek de religia sameco. Ni petu al la historio la ŝlosilon pri la ekzisto de Svislando.

A.- Svislando formiĝis ĉirkaŭ lago, kiun oni nomas la Kvar-kantona Lago. Dum la 13-a jarcento la Uri-anoj konstruis straton ĉe la Gotarda pasejo. Ilia civito pro tio fariĝis ekonomie kaj strategie potenca, ĝuste kiam la imperiestra povo malfortiĝis en la Sankta Imperio Romia Germana. Dum 17 jaroj mankis eĉ imperiestro.

C1.- En Uri okazis interklana konflikto kun repaciga interveno de la feŭda mastro Grafo de Habsburgo, kiu profitis fortikiĝi sian pozicion de reganto. Saĝe la uri-anoj decidis estontece mem solvi similajn konfliktojn. Ili akceptis tiucele ĉarton, kiu interalie diris:

A.- "Okaze de gravaj konfliktoj inter individuoj, eminentuloj tuj devos sin intermeti kaj labori por repacigi la partiojn."

C1.- En 1270 Rodolf de Habsburg estis elektita imperiestro. La alpaj civitoj Uri, Schwytz kaj Nidwald reage faris pakton de komuna defendo. En ĝi paragrafo reprenas la decidon de la Ĉarto de Uri:

A.- "Okaze de konflikto inter du civitoj, la tria civito devos aŭtomate interveni kiel arbitracianto. Kaj se unu el la konfliktantoj ne akceptos tiun arbitracion, tiu tria civito devos militi kontraŭ ĝi apud la konfliktanto, kiu akceptos la arbitracion."

Cl.- Tiu alianco signifis fakte cedo de parto de sia civita suvereneco profite al la tuto: la ligo inter la tri civitoj. Ĝi signifis perdon de la rajto memjuĝi la propran kaŭzon. En la pakto estis nenia temp-limigo.

A.- Dum la unua jarcento de la ligo pli ol 200 konfliktoj estis submetitaj al la arbitrado de la tria civito. De 1270 ĝis nun fakte neniam okazis armita konflikto inter tiuj ĉi tri landoj Uri, Schwytz kaj Nidwald, kiuj faris grandan malkovron.

C1.- Ili malkovris vakcinon kontraŭ la viruso de la naciismo. En 1919 la ĵus kreita Ligo de Nacioj rifuzis uzi tiun ĉi vakcinon. La alianciĝintaj nacioj restis memjuĝantoj pri la propraj kaŭzoj okaze de konfliktoj. Pro tio ili ne kapablis solvi la internaciajn konfliktojn. Estas proksimume la sama situacio kun Unuiĝinta Naciaro.

A.- La estroj de Uri, Schwytz kaj Nidwald agis multe pli realisme. La Dieto aŭ Konsilantaro de ilia Ligo havis la juran povon por interveni okaze de konflikto inter du el la tri lig-anoj. La fondintoj de Ligo de Nacioj kaj poste de Unuiĝinta Naciaro kontraŭe restis utopiistoj. Jen la dramo de nia epoko.

Cl.- Kiam la imperiestro Rodolf de Habsburg mortis en 1291, tiuj tri federiĝintaj civitoj Uri, Schwytz kaj Nidwald sentis la bezonon renovigi kaj kompletigi sian ĉarton. Tiu pakto de 1291 estas fiere konservata en Ĉarta Muzeo, kiu troviĝas en la urbo Schwytz. Ĝi donis al tiu federacio juran, politikan kaj defendan karakteron. Kun la unua pakto de 1270, tiu dua pakto de 1291 estas la ĝermo de la hodiaŭa svisa federacio.

A.- Sed la reganta duka familio de Habsburg, ne povis longe toleri la sendependiĝon de tiuj tri arbaraj civitoj Uri, Schwytz kaj Nidwald. En 1315 la Duko Frederik kaj Leopold de Habsburg decidis definitive detrui tiun ribelemon al ilia potenco. Dum unu Duko atakis la civiton Schwytz, la alia atakis la civiton Nidwald.

Cl.- La rezulto estis la batalo **Morgarten**, speco de mezepoka **Dien-Bien-Fu**, kiu anoncis la ekfinaĝon de la kavaliraj militoj. La duka armeo estis ĵetita en la lageton **Aegeri**. La Schwytzaj kamparanoj luktis per hakiloj, forkegoj, falĉiloj, per ĵetado de trunkoj kaj rokoj, kiujn ili faligis sur la dukan armeon. Per tiuj nekutimaj rimedoj ili defendis la propran liberecon. En la kamparanaj komunumoj de tuta Eŭropo oni raportis pri tiu ĉi batalo, kaj la flago kaj la nomo de Schwytz iĝis por la eksteruloj la flago kaj la nomo de la ligo mem. Svivlando etimologie signifas Lando de la Schwytz-anoj.

A.- Post tiu venko en Morgarten nova pakto estis redaktita, tiam ne plu en la latina lingvo, kiel la du unuaj, sed en la germana, por povi esti komprenata de la civitanoj. Ĝi estis laŭtlekata komence de ĉiu asembleo de la civitanoj, kiun oni nomis **Landsgemeinde**.

C1.- La urbo Bern, kiel 4 aliaj najbaraj civitoj, kiuj fakte luktis kontraŭ la Schwytz-anoj en 1315 pro obeo al la dukoj de Habsburg, poste alianciĝis kun la 3 arbaraj civitoj Uri, Schwytz kaj Nidwald. Tiel, ekde 1353 la Svisa Konfederacio grupigas 8 kantonojn. Sekvos ekspansia periodo, dum kiu la urboj Bern kaj Luzern instigos la kamparanojn de la teritorioj de la Duko de Habsburg ribeli kontraŭ la duka povo. Post la ribeloj la Bernanoj kaj Luzernanoj iras helpi

la ribelintojn kaj simple aneksas iliajn teritoriojn. Tiel Bern kaj Luzern konkeras vastajn teritoriojn.

A.- En la kreskanta civito Bern, komplika jura sistemo, kiu respektas la komunumajn liberojn, bone difinas ĉies rajtojn. Sed la decidiga reg-povo restas en la manoj de kelkaj aristokrataj familioj, kiuj vivas en la urbo Berno. Eĉ tiu ĉi urbo la regantaj familioj pli kaj pli gvidis eĉ la tutsvisan politikon. En la propra kantono ili elektis estrojn, kiuj regadis en distriktaj kasteloj. Ekstere de la Svisa Ligo ili ambasadoris favore al la tuta ligo.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportos pri la dua etapo de la formiĝo de la Svisa Federacio. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*